

**Kunvokilo
Ordinara Membrokunsido
sabaton, la 29an de majo 2010**

La Komitato invitas vin partopreni en la Ordinara Membrokunsido okazonta la 29an de majo 2010.

Tagordo

8h à 12h: nombrado de balotiloj ricevataj perpoŝte, koncerne elektadon de estontaj komitatanoj. Ĉiu societano rajtas ĉeesti.

14h: malfermo de Ordinara Membrokunsido

- 1) nombrado de ĉeestantoj kaj rajtigiloj, por kontroli, ĉu estas valida kvorumo.
- 2) evoluo de la nombro da societanoj kaj de la socia kapitalo
- 3) agadraporto 2009, poste debato kaj voĉdono
- 4) financa raporto 2009, poste debato kaj voĉdono
- 5) jura reguligo: raporto,
- 6) konstrulaboroj planindaj: raporto de la ekspertizo kaj debato
- 7) diversajoj

Ĉi-kune troviĝas :

- la financa raporto kaj la agadraporto 2009,
- la kontoj (bilanco kaj rezulto-konto) 2009,
- antaŭvidita buĝeto 2010,
- projektoj kaj sinprezentadoj de la kandidatoj por la komitato (pli longaj versioj troviĝas en nia retejo),
- aldonaj informoj pri voĉdono, rajtigilo, blua koverteto en kiun vi metu **nur** vian voĉdonilon,
- programo de staĝoj 2010
- la protokolo de eksterordinara membrokunsido de la 30a de januaro 2010
- pleniginda kupono, por konfirmi vian deziron resti societano de la Kulturdomo (nepre plenigu kaj resendu al la Kulturdomo, se vi ne jam faris okaze de la antaŭa membrokunsido)

Ni esperas, ke vi partoprenos multnombre en tiu ĉi membrokunsido. La societanoj, kiuj ne povos veni mem, bonvolu sendi sian rajtigilon kun la nomo de unu el la ĉeestontaj societanoj en membrokunsido.

NB: Se la rajtigilo ne mencias nomon, tiu ĉi tamen validas por kalkulo de la kvorumo (necesas ĉeesto aŭ rajtigo de 1/6 de la societanoj, por ke validu la membrokunsido).

Esceptokaze, pro la granda nombro da ĉi-kunaj dokumentoj, tiuj ĉi atingos vin nur unulingve : franclingve se vi loĝas en Francio, Esperante alikaze. Tamen en ambaŭ lingvoj vi povos legi ilin en la retejo : **<http://gresillon.org>** en la lasta rubriko « Membrokunsido / Assemblée ».

Ĉi-rilate, antaŭdankon, se vi helpas nin trovi la societanojn, kies validan adreson ni ne plu havas : listo de ili afiŝiĝas en la retejo en la rubrikoj « Dokumentoj ».

Laŭ la decido farita dum Eksterordinara Membrokunsido de la 30a de januaro 2010, pri financa kaj agadraporto oni voĉdonos nur post la debato, dum la membrokunsido mem. Ĉeestantaj societanoj voĉdonos por si mem kaj por la homoj, kies rajtigilon ili havos.

Aliflanke, **voĉdonoj** por la komitato **devas alveni nepre poŝte**, laŭ la dukoverta proceduro, **plej malfrue vendredon antaŭ la membrokunsido**.

Financa raporto 2009

Ni taskigis profesian kontiston, el la firmao « CER France », kies unu agentejo situas en Baugé (49).

Enspezoj 2009 = 29 076 € (29 707 € en 2008).

Malpli da gastoj ol en 2008 : 396 noktoj *anstataŭ 584 en 2008*.

Elspezoj pro manĝaĵoj : 2 300 € *anstataŭ 12 716 € en 2008*.

Enspezoj: someraj staĝoj: 15 540 €, lu-kontraktoj: 4 000 €, staĝoj « Arbogreftado, Japanujo, Kreado-atelieroj »: 2059 €.

La Kulturdomo posedas nun profesian kuirejon ; la Departementa Direkcio de Veterinaraj Servoj rajtigis nin kuiri ĉiujn manĝojn surloke. Sekve, en 2009, ni ne bezonis aĉeti aliloke kuiritajn manĝojn, kaj tio rezultigis tre kontentigan profiton : 6 500 € por la 4 semajnoj de someraj staĝoj.

Agadraporto 2009

La Komitato kunsidis 5 foje en 2009. Ekzistas 8 komisionoj : financoj, staĝoj, komunikado/informadiko, eldonado, libro-servo/biblioteko/arkivoj, tekniko, mastrumado, naturo, statutoj/regularoj/projektoj.

Someraj staĝoj

Okazis 4 semajnoj da someraj staĝoj en 2009 anstataŭ 5 en 2008.

La nombro da ĉeestantoj (staĝanoj, feriantoj, volontuloj) malkreskis de 134 ĝis 86, do meza nombro da ĉeestantoj en unu semajno iĝis 22 anstataŭ 27.

- el tiuj malkreskis la nombro da staĝanoj kaj feriantoj de 91 ĝis 57, t.e. de 18 ĝis 15 dum unu semajno.
- el tiuj la nombro da alilandanoj el 7 landoj malkreskis de 22 ĝis 16, do meze 4 ĉiusemajne,
- el tiuj la volontuloj (meze ĉiusemajne: 3 instruistoj, 1 aŭ 2 gvidantoj de aktivaĵo, 1 staĝestro kaj 2 aŭ 3 volontuloj por kuirado kaj purigado) nombris sume 24, do 6 ĉiusemajne. Ili konsistigis trionon el la ĉeestantoj.

Partoprenantoj estas kontentaj pri la staĝo, pretas reveni kaj konsilos restadi en Greziljono. Tamen tro malgranda restas la nombro da staĝanoj, kaj alilandanoj estas tro malmultaj.

Staĝanoj aparte ŝatas la semajnojn pri difinitaj temoj.

La beleco de la ejo, la tre turisma regiono, la kampadejo, la senkabla interret-konektebleco kaj la informadika ĉambro konsistigas ŝatatajn avantaĝojn.

Agadoj ekster somero

3 staĝoj okazis ekster la someraj staĝoj : staĝo pri Arbogreftado dum marto (1 tago, 6 staĝanoj), staĝo Japanujo en aprilo (2 tagoj, entute 21 staĝanoj, meze 17 staĝanoj ĉiutage, 4 volontuloj), staĝo Kreado-atelieroj dum majo (3 tagoj, entute 10 staĝanoj, meze 10 staĝanoj ĉiutage, 2 volontuloj),

Septembre oni okazigis piknikon en malstreĉita etoso.

Lu-kontraktoj

Greziljonon oni luis por :

- du familiaj festoj en majo kaj junio
- unusemajna trejnado al Internacia Olimpiado pri Matematiko (asocio Animath), 21a ĝis 28a de aŭgusto,
- somera universitato de Eŭropo Demokratio Esperanto, 28a ĝis 30a de aŭgusto.

Eldonado

La revuo Kulturaj Kajeroj aperis trifoje en 2009. Reeldoniĝis « Omaĝo al Henri Micard ».

Presado de kolora varbmateriale por Greziljono: dokumentujoj, afiŝoj, paĝ-memorigilo...

Statutoj - Regularoj – Projektoj

La juran traktadon de la Kulturdomo realigas « Buroo Fiska kaj Jura de la Luarlandoj » (BFJPL) kies sidejo situas en Angers (49).

La modifoj de la statutoj voĉdonitaj en januaro 2010 ne povas esti validigitaj tuje ĉar la Kulturdomo devas unue esti registrita laŭ la statutoj 1951, la nuraj nune validaj.

Komunikado - Informadiko

La komisiono Komunikado - Informadiko kreis sliparon de retadreso, kio ebligas atingi pli vastan publikon ol per naciaj kaj regionaj retlistoj en Francujo, por informi pri someraj staĝoj kaj diversaj aliaj staĝoj dum la jaro. Ne hezitu konigi al ni **vian retadreson** se vi deziras ricevi regule tiajn informojn.

Tekniko

- elĵeto de pluvakvo el la malantaŭo de la okcidenta dependejo (Zamenhof) al la lageto ;
- plumbista riparo sekve de frosto en la kastelo kaj la kampadejaj duŝoj ;
- refaro de plafono en kuireja lavujo + legomejo ;
- anstataŭigo de kuvo por rubakvo ;
- anstataŭigo de lavmaŝino por manĝilaro ;
- aldono de elektraj konektingoj por elektraj hejtiloj en manĝoĉambroj + centra salono.

Mastrumado

La dormĉambroj 16, 17, 18 kaj 19 estis renovigitaj (tapeto, ŝutroj, littegitilo) kaj ankaŭ la koridora tapeto. La kuirejaj ŝutroj estis riparitaj kaj farbitaj.

Naturo

- tilion oni fortranĉis inter la ateliero kaj la hejtejo.
- la laborhelpa asocio « Envol » el Baugé purigadis la bordon de la rivereto proksime al lageto de Tourniquet
- por plibeligi la ĉirkaŭaĵon de la kastelo, oni plantis multajn arbustojn
- gvidlibreton pri la interpretada pado, rekdaktitan Esperantlingve kaj franclingve, oni eldonis kaj disvendis al la staĝanoj en Greziljono.

Diversaĵoj

- ne hezitu konsulti nian retejon <http://gresillon.org> (rubrikoj « Agendo » kaj « Someraj kursoj ») kaj helpi nin dissendi informojn pri la staĝoj.

- **la tarifo por 2010 ne plialtiĝis** ; ni eĉ sukcesis iomete malpliigi la prezon de la du ĉefaj manĝoj ĉar antaŭ la komenco de la staĝoj 2009, ni ricevis la permeson kuir ĉiujn manĝojn surloke, kio ebligas ŝpari kompare kun antaŭaj jaroj, kiam necesis mendi manĝojn de ekstera vendejo. Krome la variajn manĝojn tre ŝatis la staĝanoj, laŭ kvalito kaj laŭ kvanto.

- **favora semajna prezo** ekzistas por someraj staĝoj, kiam la aliĝo kaj la pago alvenas antaŭ la 1a de junio, por instigi pli fruan aliĝon. Pli favora prezo okaze de « kongresoj », kun 20-eŭra rabato kompare kun la alia favora tarifo, aplikiĝas al aliĝantoj okaze de Membrokunsido de Bretona Federacio, SAT-Amikaro, UFE, aŭ aliĝantaj kaj al staĝo en Greziljono kaj al tiu en Pluezek (Bretonio). Ankaŭ staĝanoj restantaj du semajnojn ĝuas saman rabaton

✂..... ✂..... ✂.....

ATTENTU (rajtigilo dorse) / *ATTENTION (pouvoir au verso)*

- Plenigu la rajtigilon se necesas / *Complétez le pouvoir le cas échéant.*
- Se vi ne povos ĉeesti la Ordinaran Membrokunsidon, ne forgesu sendi la rajtigilon, ni bezonas ĝin por atingi la kvorumon ! *Si vous ne pouvez pas participer à l'Assemblée Générale, n'oubliez pas d'envoyer le pouvoir, nous en avons besoin pour atteindre le quorum*
- Sendu al / *Envoyer à* : Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, FR-49150 BAUGÉ

Dankon / *Merci*

